

la
verda
stelo



**Esperanto
Nederland**

**sekcio
Groningen-Drente**

decembro 2005



LA VERDA STELO

eldono de Esperanto-klubo
GRONINGEN-DRENTE,
sekcio de
ESPERANTO NEDERLAND

Prezidanto :

s-ro J.S. Swenker
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
tel. 050 527 45 72

Sekretariejo:

s-ino W. van Ganswijk-Vlasblom
Huygensstraat 27
9727 JA Groningen
tel. 050 525 00 86

Kasisto:

s-ro L. Staghouwer
Julianalaan 25
9781 ED Bedum
tel. 050 301 40 15



Kunvenejo:

Dreesflat, W. Dreesstraat 1
ĉiun alternan ĵaŭdon ni kunvenas de
la 19h45 ĝis la 21h45

Esperanto-centro :

T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC Groningen
J. Swenker, tel. 050 527 45 72

Redakcio:

Koos Scharroo
Wil van Ganswijk-Vlasblom



Enhavo

- 1 ... Forpasoj
- 2 ... Klubvesperoj, naskiĝdatrevenoj
- 3 ... Kio okazis en Groningen?
- 9 ... Ni ricevis...
- 10 ... Unika ŝanco por Nederlando
- 11 ... Studosemajnfino en Vlaardingen
- 12 ... Kiam vintro cedas...

Contributie afdeling Groningen-Drente

Afdelingslid (incl. abonnement LA VERDA STELO)	€ 11,34
Gezinslid	€ 5,67
Doneur (minimaal)	€ 5,67
Abonnement LA VERDA STELO	€ 5,67

Over te maken op Postbanknr. **3822472** t.n.v. afd. Groningen,
ESPERANTO NEDERLAND te Bedum

Leden van afd. Groningen-Drente worden geacht lid te zijn van
ESPERANTO NEDERLAND

Vandaar dat wij hier ook het gironummer ervan vermelden:

Postbanknr. **375522** t.n.v. ESPERANTO NEDERLAND te Heerhugowaard

Lidmaatschap (incl. abonnement FEN-X)	€ 25,00
Gezinslid	€ 7,50

Forpasoj



† Lies Broekema – Clemens Schröner

La 27-an de novembro 2005 en la aĝo de 89 jaroj forpasis *Lies Broekema*, unu el niaj membroj, kiu dum multaj jaroj estis anino de nia klubo.

La antaŭan jaron ŝi ricevis de Esperanto Nederland memoraĵon pro la fakto, ke ŝi estis jam dum 50 jaroj membro de Esperanto-unuiĝo.

Krom sia granda pasio al muziko kaj sia intensa intereso pri filozofio ŝi tre ŝatis Esperanton.

Ŝi regule ĉeestis niajn kunvenojn, kontribuis per novaj ideoj, ne ĉiam realigeblaj, sed tio klare montris ŝian grandan ligitecon kun Esperanto kaj ties disvastigado.

La kontakto de Lies kun *Victor Kiselev*, esperantisto en Duŝanbo, Taĝikio estis unue skriba. Ŝi invitis lin al si kaj al nia klubo, kie li prelegis. Poste ili preskaŭ ĉiun semajnon telefone kontaktiĝis. La amikeco kun li donis dum longa periodo ĝojon al ŝia vivo. Finiĝis ankaŭ lia vivo, pli frue ol tiu de Lies, sed ŝi regule rememorigis lin en nia ĉeesto.

Ni tre bedaŭros la foreston de Lies. Dum la adiaŭa soleno en la preĝejo de Noordlaren mi esprimis tiun senton.

Al ŝi ni deziras, ke ŝi ripozu en paco.

Wil van Ganswijk-Vlasblom

Post longedaŭra malsano forpasis la 5-an de novembro *Hoite Hiemstra*, abonanto de La Verda Stelo.

Li kaj lia edzino Tjaaktje estis pasintece anoj de FLE. Ĉar ĵaŭdvespere ili jam dum multaj jaroj okupas sin pri sukurismo (unua helpo post akcidentoj), ili neniam ĉeestis niajn klubkunvenojn. Kelkfoje ili vizitis nian Zamenhof-tagon. Bram van der Heij kaj Wil van Ganswijk reprezentis nian klubon dum la kremaci-soleno.

Klubvesperoj

januaro

- 12 vivanta gazeto
- 26 gramatiko

februaro

- 9 jarkunveno
- 23 ludoj

marto

- 9 spritaĵoj
- 23 H.C. Andersen

aprilo

- 6 gastpreleganto
- 20 senfadenaj retoj

majo

- 11 (*anstataŭ 4, pro memortago!!*) kvizo
- 18 kune manĝi



Naskiĝtagoj

januaro

- 4 W. van Ganswijk-Vlasblom
- 13 G. Lanooy-Nijlusing
- 27 Ineke Emmelkamp
- 28 R.A. Haadsma
- 30 A.W. vd Veen

februaro

- 11 H. van Kappen
- 17 A.A. Bellekom
- 18 S. Kok-Czeswinska
- 28 Luit Staghouver

marto

- 24 E.J. Begeman
- 24 H. Behr

aprilo

- 1 T. Bulk-Beenen
- 6 P. van Kappen-vd Kamp
- 17 M.K. Heide

majo

- 7 G.C. Boer
- 11 J. Hennekam-Tijsa
- 31 J.W. Moonen



Gratulon!

Kio okazis en Groningen?

La 8-an de septembro 2005

La nova sezono komenciĝis. Kiel kutime dum la unua kunveno de la sezono, ni babilis pri la somera libertempo.

Wil van Ganswijk kaj Bets Dodebier estis en Esperantujo. Ili iris al la UK en Vilno (Vilnius). Ankaŭ ekster la kongreso oni povis sperti la lingvon Esperanto, kio jam komenciĝis en la flugmaŝino de la litova flugfirmao. En la flugmaŝina magazino estis 6-paĝa artikolo pri Esperanto.

En iu restoracio la manĝokarto haveblis ankaŭ en Esperanto. Bedaŭrinde tio ne bone funkciis, ĉar kelneroj ne scipovis Esperanton.

Wil renkontis *Aleksas Masjukas*, kiu nun fartas bone. Ni vidis multajn fotojn pri la kongreso kaj pri la vojaĝo post la kongreso. La fotoj montris inter aliaj Masjukas, Arjen-Sjoerd de Vries kaj la nepon de Zamenhof.

Kiam oni petas de Google: serĉu por mi *sleutel* kaj *Esperanto*, tiam Google trovas la *Esperanto-ŝlosilon*. Dum la somero Koos Scharroo preparis de la ŝlosilo retan version.

Interesa estas la litero *ŭ*, kiu ja estas Esperanto-litero, sed en la *ŝlosilo* komenciĝas per ĝi neniuj vorto. Por ĉiu alia litero Koos faris ligon al la paĝo kun vortoj, kiuj komenciĝas per tiu litero. Ĉar kelkaj homoj plendis, ke la ligo de la litero *ŭ* ne funkcias, Koos faris ligon ankaŭ de tiu litero al paĝo, kiu eksplikas, ke preskaŭ neniuj vorto komenciĝas per ĝi.

Ĉu vi memoras la veteron de la pasinta somero? Estis tiel pluve, ke Johan Swenker ne povis iri eksteren. Li do prenis sian lutilon kaj lutis kelkajn dratojn al elektrona termometro. La aliaj ekstremaĵoj de la dratoj estas por la komputilo, kiu nun scias kiel varme estas en la ĉambro. Ĉu utile? Ne. Ĉu amuze? Jes.

Ĉu vi memoras la veteron de la pasinta somero? Estis tiel malvarme, ke Luit Staghouver ne povis tranokti en sia tendo. La unuan semajnon de sia ferio li do luis dometon.

Ĵus antaŭ ol Wim Rijnders vojaĝis al Kroatio, kie en la vilaĝoj estas ankoraŭ restaĵoj de la milito, la ĵurnaloj menciis, ke nederlandano grave vundiĝis tie pro mino. Sed Wim ne estis en la regiono, kie estas ankoraŭ minoj.

Bedaŭrinde ne estis pli da personoj, sed Wil havis multajn fotojn. Ŝi do povis montri ilin kaj paroli pri Litovio ĝis la fino de la vespero.

La 22-an de septembro 2005

Koos elreviĝis pro la malmultaj reagoj, kiujn li ricevis post la sendo de proksimume 130 invitiloj pro la Malferma Vespero. Reagis nur du personoj, el kiuj unu malanoncis sin, kaj la alia ja intencis ĉeesti tiun vesperon. Pli kontenta li estas pri la nombro da esperantistoj, kiuj vizitis la *ŝlosilon* en Interreto. Ne nur nederlandaj esperantistoj trovis la vojon al ĝi, sed ankaŭ esperantistoj de aliaj landoj, interalie de Japanio.

Per la interreta programo *Skype* li parolis kun iu, kiu poste sendis al li poemon, kiun oni povos legi en nia informilo (pĝ. 4). Per *Skype* oni povas i.a. senkoste telefoni eksterlanden.

Wil kunportis kelkajn gazetartikolojn pri Esperanto kaj la tekston de intervjuo kun ges-oj Bossong kaj Marianne Verreijt el Eindhoven. El Ĉeĥio ŝi ricevis leteron kun korespondopeto, kiun ŝi transsendis al iu eble interesiĝanta.

La Esperanto-grupo de *Montendre* (Francio) festis sian 10-an datrevenon, pro kio ŝi sendis gratulkarton kaj poste ricevis dankokarton.

Telefonis al Wiebren *Radio Oskar*, la loka

radiostacio de la komunumo *Skarsterlân*, ĉar oni volonte ricevos kelkajn informojn rilate la peton de Esperanto Nederland samnomigi straton laŭ *Zamenhof* aŭ *Esperanto* en ĉiuj nederlandaj komunumoj okaze de centjariĝo de Esperanto en Nederlando. Wiebren irigis *Radio Oskar* al la koncerna informanto de Esperanto Nederland.

Familio

Mi rememoras mian tempon de printempo apud patro kaj patrin'. Por infanoj familio estas ĉio, sed ne ĉiuj havas ĝin. La familio estas bela, don' ĉiela. En la preĝoj petu ni, ke por infanoj de la mondo en estonto ne plu manku famili'!

Sylla Chaves

Johan ricevis retmesaĝon el Svedio. Sveda geedza paro intencas viziti klubvesperon de nia klubo. Ili vizitos ankaŭ la urbon Groningen. Eble kelkaj membroj gvidos ilin tra la urbo.

Luit rakontis ion pri vizito al kulturejo en Warffum kaj al *Het land van Ootje* en Den Andel. Li havis bonŝancon: en Warffum li povis foto *alcionon*, unu el la plej belaj birdoj en Nederlando. (vidu la frontopaĝon). La posedanto de *Het land van Ootje* opinias ĝin ĝardeno. Eble li pravas, sed Luit opinias, ke temas pri kolekto da plantoj sur kampo. Inter alie pro malsano de la 'ĝardenisto' ĝi estas pli ol nur iomete ĥaosa.

Post la interŝanĝo de la sciindaĵoj Wil montris la duan bendon de la kurso *Esperanto, pasporto al la tuta mondo*. Ni ri-

gardis la 5-an lecionon. Estas amuza kurso, sed ni demandas nin, ĉu kursanoj, kiuj bone komprenas la tuton, ankoraŭ bezonas tiun kurson. Sed ni rigardis nur parton de la kurso, kiu konsistas krom vidbendo ankaŭ el studlibro.

La 6-an de oktobro 2005, Malferma Vespero

Partoprenis ĝin unu junulo, kiu intencas lerni Esperanton, du gekursanoj de Fieke van der Veen, du svedaj esperantistoj, kiuj estas dumvoje per loĝaŭto inter Svedio kaj Hispanio kaj 6 klubanoj. Kiel kutime en tiaj vesperoj ni komencis laŭvice prezenti nin unu al la aliaj. Estis ankaŭ ebleco demandi pri kio ajn.

Sur aparta tablo kuŝis ĉiaj Esperantaj libroj. Wiebren regalis nin ĉe la kafotrinkado.

Voĉlegita estis retmesaĝo de *Dennis van der Heijden*, kiu nun volontulas en Ugando, kaj kolektitaj estis la nomoj de kunvojaĝontoj al Oldenburgo, la 17-an de decembro.

Kutime Wil donas provlecionon dum malferma vespero, sed ĉi-foje ŝi invitis la novulon veni al ŝia domo por informiĝi pri la lingvo, por ke ŝi nun povu montri la unuan parton de instrufilmo *Pasporto al la tuta mondo*.



rolantaro de la vidbenda kurso

“Aĥ...!” estis la reago, kiam Johan subite haltigis la filmon pro la fino de la agrabla vespero. Vere agrabla ĝi estis, kvankam multaj personoj, ho ve!, ne reagis al nia

invito ĉeesti ĉi tiun malferman vesperon.

La 20-an de oktobro 2005

Venis el Germanio mesaĝo, ke oni nin atendas la 17-an de decembro en Oldenburg ĉe s-ino Elfriede Coburger je 10h00 por trinki kafon, post kio ni vizitos kastelon, tagmanĝos kaj vizitos kristnaskobudaron. Proksimume 6 el ni tien iros.

Antaŭ ol venis ĉe Wil la malfermvespera gasto s-ro *Dennis Rona* por informiĝi pri Esperanto, ŝi ekhavis la ideon inviti ankaŭ siajn najbarojn, el kiuj efektive venis du. La triopon ŝi instruis laŭ kaj rekta kaj gramatika metodoj.

La temo estis *libroj*.

Luit eraris aŭ pri la dato aŭ pri la temo, ĉar li kunportis poemojn. Biciklante tra la provinco, li fotis poemojn tabule montritajn kaj verkitajn dialekte, kiujn li tradukis en Esperanton, pri kio li parolos la sekvan fojon. Lia lastlegita libro estis de *Tibor SEKELJ* kun mallongaj noveloj, pri kiuj li ne ĉiam povis bone taksi, ĉu la rakontoj estas veraj aŭ fantaziaj.

Koos kunportis la bildrakonton *Tinĉjo en Tibeto* (NL: *Kuifje in Tibet*), kiun eldonis franca asocio okaze de la centjariĝo de la unua UK en Bulonjo-ĉe-maro. Amuze estas prezentitaj i.a. kulturaj diferencoj. Ekzemple, tibetanoj salutas per elŝovita lango, kion ŝipkapitano Hadako interpretas malĝentilaĵo kaj recipokas per la gesto *longa nazo*, tenante antaŭ la nazo la manon kun disetenditaj fingroj. Pli poste, kiam Hadako, laŭ tibeta metodo, salutas lange, oni imitas lian humiligan geston, supozante ĝin kutimo.

Wil iam epitomis siajn librojn legitajn. Montriĝis, ke el ni ĉiuj ŝi estas literature la plej klera: ĉirkaŭ 75 titolojn ŝi menciis, sed certe legis multe pli sen resumi ilin. Ŝi voĉlegis sian epitomon de *Marta*, tragika verko de Éliza ORZESZKO, tradukita de Zamenhof. Temas pri virino, kiu sen vivrimedoj devas helpi al si. Pri malpli luksaj tempoj ni ĉiuj konas ekzemplojn.

Gramatiko

Luit uzis en sia lastfoja protokolo la vorton *geedzoj*, kiu signifas en la nederlanda lingvo *echtbaar*, sed pri kiom da homoj temas, se paroli pri ekzemple du aŭ tri geedzoj? Verŝajne estas pli oportune paroli pri *geedzoj*, se temas pri nur la duopo. Aliokaze oni parolu pri *geedzaj paroj* por eviti konfuzon.

Koos korespondis kun pola kursanino de *lernu* pri leciono el la kurso *la tuta Esperanto*. Montriĝas, ke por tiuj, kiuj ne havas difinan artikolon propralingve, malfacilas ĝin apliki. Tamen, ties uzado en Esperanto ne tute identas kun tiu en la nederlanda, ekz-e *moeder zit bij het raam kaj ik reis met de trein* estu tradukitaj en Esperanton *la patrino sidas ĉe la fenestro, mi vojaĝas per trajno*.

Ellie, kursanino de Wil, havigis al ŝi enigmon el la studolibro *Post la Kurso*, kiu tekstas jene: *Homo kaj frukto min havas kun g, lerta artisto min faras kun b, multajn metalojn mi manĝas kun r*. La solvon elpensu vi mem!¹

Diskuton kaŭzis ankaŭ la korektenda frazo: **de ambaŭ kursanoj la plej juna lernas la plej bona*.

En Esperanto, kiam la komparo koncernas nur *du* aferojn, oni uzadas, malsame kiel en la nederlanda, la *komparativon* (vergro-tende trap) anstataŭ la *superlativon* (over-treffende trap). Tio estas logika, ĉar inter du aferoj, se unu estas ekzemple pli juna ol la alia, ĝi estas samtempe la plej juna el la du. En tiu okazo, oni distingas tamen tiun superlativ-signifan komparativon disde la ordinara komparativo per la antaŭmeto de la artikolo; komparu *ŝi estas pli juna ol ŝia fratino* kun *ŝi estas la pli juna*. Dank' al tiu forma distingo, oni ne bezonas esprimi, ke temas pri du aferoj.

La frazo do tekstu: *el la/ambaŭ kursanoj la pli juna lernas pli bone*.

¹ gusto – busto – rusto

La 3-an de novembro 2005

Ĉe la enirejo oni tuj vidis du grandajn skatolojn kun libroj. Estis Wiebren, kiu prenis ilin de s-ro de Boer el Frislando, kiu transloĝiĝos al pli malgranda domo kaj ne povos konservi ĉiujn Esperantajn librojn. Wil tuj trovis plurajn ekzemplerojn por la interretkursanoj!

Okazis multaj aferoj. Wil parolis pri la venonta klubvespero, la 17-a de novembro. Tiam ni havos du gastojn alilandajn (rusinon kaj germanon), kiuj estas geamiko de Adri Oosterwijk.

Eble okazos informfoiro la 10-an de decembro, pri kiu Wil informos nin la venontan kunvenon.

Nia vojaĝo al Oldenburgo, la 17-an de decembro, certe okazos. El tri provincoj kunvojaĝos ok personoj. Atendos nin agrabla programo.

Feliĉe restis tempo por la planita programo: *poemoj*.

Luit biciklis tra la provinco Groningen kaj trovis tabulojn apud la vojo kun groningenlingvaj poemoj. Li tradukis unu poemon en la duan lingvon por ni ĉiuj. (pĝ. 12)

Koos trovis kelkajn belajn ŝercojn de *Raymond Schwartz*, kaj Wil laŭtlegis poemon el Afriko.

La 17-an de novembro 2005

Specialaj gastoj: Irina el Peterburgo, Ferdinand el Germanio kaj Machteld, Judith kaj Paul, gelernantoj de Fieke vd Veen.

Ĉar la atendita preleganto por ĉi tiu vespero (Sylvain Lelarge) devis malanonci sin, Wil invitis Irina veni al nia klubo kaj fari prelegon, kion tiu volonte akceptis.

Wil ricevis leteron el Oldenburgo kun la programo de la venonta Zamenhof-tago, kien ni iros okope. Ŝi ricevis leteron ankaŭ de Aleksas el Murmanko.

Ineke kunportis lumdiskojn kun kristnakaj kantoj de Akordo. La diskoj kostas po 15 eŭrojn.

Irina kaj Ferdinand estas korespondgea-

mikoj jam dum kelkaj jaroj. En Amsterdamo ili renkontiĝis unuafoje kaj de tie ili iris al Groningen por prelegi en nia klubo. Irina, kiu estas amikino de Adri Oosterwijk, membrino de nia klubo, proponis, ke unue prelegu Ferdinand, ĉar dum la veturado ŝi ĉefe dormis, kaj li havis tempon por prepari sian prelegon.



Ferdinand

Ferdinand nuntempe interesiĝas precipe pri *mistikismo*, kio laŭ PIV estas *religia aŭ filozofia doktrino kaj metodo, kontraŭe al raciismo, kaj celanta ekkoni per sento kaj imago, sed ne per intelekto, la veron kaj precipe la diajn kaj postmortajn misterojn*. Li entuziasme parolis pri ĉi tiu neĉiutaga kaj malfacila temo.

Li estas ŝatanto ankaŭ de krucvortenigmoj, en kiuj oni ofte plenigu kelkajn fakojn per literoj, kiuj konsistigas vorton signifantan *mondolingvo*. La celita lingvo plejofte estas *Esperanto*. Tiaj krucvortenigmoj estas la kaŭzo, ke Ferdinand esperantistiĝis.

Irina parolis ĉefe pri la situacio en Rusio. Pro tio, ke en radio kaj televido oni nuntempe prezentas la novaĵojn ne objektivite, ŝi fordonis siajn du televidilojn kaj aŭskultas nur muzikon. Ŝi opinias, ke en Rusio ne plu estas honestaj ĵurnalistoj. La plej grava fonto de novaĵoj estas por ŝi Interreto.

La vivo en Peterburgo estas pli malfacila ol en Moskvo. La elspezoj en ambaŭ urboj estas egalaj, dum en Peterburgo la enspezoj estas grave malpli altaj. Rusa proverbo tekstas: *se oni estas juna kaj volas prosperi, oni iru al Moskvo.*



Irina

Enloĝantoj de Peterburgo estas registritaj nur, se ili posedas propran domon. Se oni domon luas, oni ne estas registrita, pro kio oni ofte havas gravan problemon.

Nuntempe oni *ne* plu uzas jenan proverbon: *ne gravas, se hodiaŭ estas malbona, morgaŭ ĉio estos pli bona.* De la 90-aj jaroj homoj estu krimuloj, se ili volas havi prosperan entreprenon.

Dum pluraj jarcentoj la ĉefaj rusaj problemoj estis: krimuloj, stultaj oficistoj, malbonaj vojoj kaj ŝtelistoj. Nenio ŝanĝiĝis. Honestajn homojn oni opinias stultaj.

Irina opinias, ke la vivo en Rusio en la *antaŭ-Putina* periodo estis pli bona ol nuntempe. En Peterburgo, kie troviĝis la unua Esperanto-klubo en la mondo, estas pli ol mil esperantistoj kaj tri Esperanto-kluboj, sed en la kluboj kunvenas kutime nur kvin ĝis maksimume dek esperantistoj.

Antaŭ nelonge oni starigis novan E-klubon por allogi esperantistojn, kiuj ĝis tiam res-

tis hejme. La nova klubo estas sukceso: ducent esperantistoj respondis al la alvoko viziti la klubvesperojn. La nova klubo nomiĝas *Espero*, sed tiu nomo estas ankaŭ de centjara Esperanto-klubo en Peterburgo.

Dum tri monatoj en 1999 Irina estis en Koreio, kie Esperanto estas tre populara. Ŝi opinias, ke Koreio estas kvazaŭ paradizo por esperantistoj, kie ĉiu loĝanto de Seulo scias pri Esperanto. En la biblioteko, kiun ŝi vizitis, estis pli ol mil Esperanto-libroj.

Ambaŭ prelegantoj ricevis ekzempleron de *Nederlanda Antologio* (pri la nederlanda literaturo) kiel memoraĵon pri ĉi tiu klubvespero.



Peterburgo

La 1-an de decembro 2005

Wil ripetis pri Lies Broekema la nekrologon, kiun ŝi voĉlegis dum la ĉi-matena rememorsoleno en la preĝejo de Noordlaren, kie ŝi ĉeestis kun Bets Dodebier kaj Luit Staghouver. Post tio ŝi petis momenton da silento.

La temon *ludoj* ni ne praktikis, sed ni priparolis diversajn aliajn temojn. Unue la ricevitajn leterojn de *Irina* el Peterburgo, *Ferdinand* el Mannheim kaj *Ann-Louise* el Svedio, de kiu lasta vi povos legi la rapor-

ton aliloke, kaj due informojn pri varbado de mono por la lernejo en Togolando kaj pri la libroj en la urba biblioteko en Groningen. Wil ricevis peton de iu knabino traduki poemon, kion ni ne faris. Eble poste. Estis raporto pri la Malferma Tago ĉe UEA, kie Koos parolis kun Petro De Smedt, kiu poste sendis liston kun korektendaj vortoj de sia vortaro, kaj kie Wil konatiĝis kun *Helga Rapley* el Elzaco, kiu same kiel Wil amikiĝis kun nia anino Tiny el Francio, nun loĝanta kun sia edzo sur la insulo Walcheren en Nederlando.

Koos prenis de Interreto la tekston de *Plena Manlibro de Esperanta Gramatiko (Pomego)* de *Bertilo Wennergren* kaj faris el ĝi dikana libron por si mem. Li nun estas la nura posedanto de libro, kiu estos eldonata venontjare.




eldonota libro

Koos ankaŭ tradukis varbajn faldfoliojn pri Esperanto el la angla en la nederlandan. La titoloj estas inter aliaj: *Ooit geweten dat liefhebben zo ingewikkeld kon zijn?* - *Stop de marteling* - *Twee miljoen redenen om Esperanto te leren* - *Maak contact*.

Wiebren montris leteron el la jaro 1967, en kiu estis petita mono por lanĉi *Teleakurson* pri Esperanto, kiu poste iĝis la kurso de *van Kooten* kaj *de Bie*!

Wil, Ineke kaj Luit deĵoros en budo en la *Immanuelkerk* la 10-an de decembro inter 13h00 kaj 17h00.

Ni interkonsiliĝis pri la horo de forveturo al Oldenburgo en la 17-a de decembro. Ni renkontiĝos je la 8-a kaj duono ĉe la enirejo de la Martini-halo.



afiŝo

“Vi laboras ne rapide”, diris la laborestro al la nova dungito, “kaj vi iras ne rapide, kaj vi komprenas ne tre rapide. Ĉu estas io ajn, kion vi *ja* rapide povas fari?”

“Jes”, diris la novulo, “kiam mi ion faras, mi tre rapide *laciĝas!*”



Ni ricevis...

Ann-Louise Åkerlund kaj ŝia edzo vojaĝis tra Eŭropo. Dum la Malferma Vespere ili vizitis nian klubon. Jen raporto pri ilia vojaĝo.

Saluton,

Finfine mi decidiĝis skribi kaj danki pro via afabla akcepto de ni dum via klubkunveno. Estis interese renkonti vin, kaj mi bedaŭras, ke ni ne sukcesis alveni pli frue. Apartan dankon al niaj gvidantoj ĝis la kampadejo. Ni certe ne estus trovintaj ĝin sen helpo.

La postan tagon ni vizitis Leeuwarden kaj uzis Interreton en la tiea biblioteko. Vespere ni atingis Afsluitdijk. Estis bela vetero kaj mi volis vidi la sunsubiron. Ni tranoktis kune kun aliaj karavan-aŭtoj en simpla parkejo tuj apud Lorentzsluizen.

En Julianadorp, proksime al Den Helder, ni renkontis *Vinus* kaj *Marijke Lathouwers*. Ili invitis nin ekskursi kun la klubo de Alkmaar al Egmond aan Zee. Tie ni surpreriris en la lumturo, inspektis la savboaton kaj aŭskultis rakontojn pri ili (en la nederlanda).

Ni daŭrigis laŭ la vastaj, belaj plaĝoj de Nederlando, kie multaj homoj ludis per kajtoj. Preter Den Haag kaj Rotterdam ni uzis la aŭtoŝoseojn kaj sukcese eskapis al la insuloj. Ni trovis ĉarman *mini camping* en bieno, restis tie du tagojn kaj iom biciklis. En Vlissingen ni ne sukcesis trovi la pramŝipon (Ni havis malnovan mapon!) kaj eksciis, ke ni iru orienten kaj uzi la tunelon.

Belgion ni sufiĉe rapide traveturis, la tuta marbordo estas barita per altaj domoj kaj banlokoj. En Francio ni spertis, ke karavan-aŭtoj ne estas bonvenaj. Preskaŭ ĉiu urbo, urbeto kaj vilaĝo salutas nin per ŝildoj, dirante, ke ni ne rajtas parki aŭ tranokti. La parkejoj ofte havas kvazaŭ porta-

lon ĉe la enirejo por malhelpi al altaj veturiloj eniri tien.

En Dunkerque ni trovis la kampadejon, sed la postan nokton ni pasigis en parkejo sur la kajo en Bulonjo-sur-mar. Estis fakte kvazaŭ kampadejo, ĉar mi kalkulis ĝis 12 karavan-aŭtoj krom la nia. Tiaj lokoj bone taŭgas, sed oni trovas ilin malofte.

La pejzaĝo laŭ la marbordo de *Côte d'Opale* estas interesa kaj bela, iom drama, kun altaj klifoj. Ĉe *Dieppe* ni bedaŭrinde perdis la vojon laŭ la maro kaj rapidis al *Le Havre*, kie la postan tagon *Silvie Caron* kaj du aliaj esperantistoj gvidis nin en la urbo. Ni partoprenis en la klubkunveno kaj vespere kun-manĝis en restoracio.



Ann-Louise Åkerlund kaj ŝia edzo

Kiam ni vizitis la strandojn, kie la alianciataj taĉmentoj surbordiĝis dum la dua mondmilito, ni kalkulis kiom da tagoj ni uzis por veni tien, kaj ekkomprenis, ke per tia malrapideco ni ne povos atingi Hispanion dum tiu ĉi vojaĝo. Ni decidis turni norden kaj same malrapide vojaĝi tra la land-interno. Unu vesperon, kiam ni ne trovis kampadejon, ni provis loĝi en *Chambre d'Hôtes*.

En bieno ni aĉetis *Calvados* kaj *Cidre* kaj pluiris nordorienten. Norde de Reims, sufiĉe proksime al la belga limo, ni trovis

malgrandan, agrablan kampadejon kaj restis tie du noktojn. La pejzaĝo ankaŭ tie estas interesa kaj bela kun montoj, riveretoj, arbaroj, kampoj kaj vilaĝoj kun fortikaj preĝejoj. Ni iomete biciklis.

Sed la vetero fariĝis pluva kaj ni decidis viziti mian studkamaradinon apud *Antverpeno*. Ŝi montris al ni la klubejon kaj la libroservon kaj presejon de FEL, kaj invitis nin al *paeljo*-festo en la skolta klubo de sia filo. Estis bonega festo.

Ni promenis dum kelkaj horoj en *Antverpeno* antaŭ ekpluvis. Dum tri tagoj ni veturis en pluvo kaj pluvego laŭ germanaj kaj danaj aŭtoŝoseoj. Ni tranoktis nur ĉe geamikoj apud *Kolonjo*, kaj pro tio revenis hejmen ne multe pli frue ol planite. Tio tute ne gravas. Ni havis bonegan tempon kaj ŝatus fari pliajn tiajn vojaĝojn. Eble en februaro-marto, sed tiam ni veturos rekte

al Hispanio, ĉar estas ankoraŭ vintro en Eŭropo.

Ĝis antaŭ unu semajno ni havis aŭtunan veteron ĉi-tie, kaj mi iomete laboris en la ĝardeno de mia filino. Kompreneble mi ankaŭ ludas kun mia nepeto *Eric*. Li havas unu jaron kaj estas tre ĉarma. Dum kelkaj tagoj ni havis freŝan vintran veteron kun iomete da neĝo, bedaŭrinde ne sufiĉe por lumigi la plejparte brunan pejzaĝon. Sed nun venas *Advento*, kiam homoj metas elektrajn kandelabrojn kaj stelojn en la fenestrojn, kaj la stratoj estas ornamitaj per lumoj. Mi ŝatas la antaŭ-kristnaskan periodon kun ĝiaj multaj tradicioj. Ĉi-jare mi ja estas libera kaj havos tempon ĝui ĝin.

Ĉion bonan al vi ĉiuj kaj ĝis revido,

Ann-Louise

Unika ŝanco por Nederlando

Unuafoje en la historio de Nederlando la Universitato de Amsterdamo mem apogas aldonon de la instruado de la lingvo Esperanto pro la sukcesaj kursoj pri Interlingvistiko.

La universitata invito lekciis krom pri Interlingvistiko **ankaŭ pri Esperanto** estas la sola ŝanco progresigi la oficialan instruadon de Esperanto mem en la plej alta nivelo, kiel de longe okazas en aliaj landoj, kiel Hungario, Germanio, Ĉinio, Koreio...

Ĉio tamen dependos de la financoj, ne troveblaj ĉe la kasistoj de Esperanto Nederland, NGGE kaj internacia Esperanto-Instituto (kiu havas la organizan taskon pri la lekciroj). La docento mem jam dekomence investas en siaj lekciroj multe pli da tempo ol la honorariata.

Se ni kredas je la valoro de nia lingvo, kiu (malgraŭ lastatempaj asertoj en kelkaj amas-komunikiloj) neniel perdis sian signifon por la nuntempa internacia socio, ni kaptu nian ŝancon kaj kontribuon se eble minimume po 6 eŭrojn al la

poŝtĝira konto **198** de '**Leerstoel Amsterdam**' en Den Haag,
menciante '**Por la Esperanto-lekciroj**'.

Anticipan dankon! Ankaŭ nome de IEI, NGGE kaj Esperanto Nederland.

Rob Moerbeek, eks-privatdocento

Pri la studosemajnfino en Vlaardingen

La studosemajnfino en Vlaardingen meze de novembro estis denove granda sukceso.

Multaj jam alvenis vendredon vespere kaj ĝuis plezurigan kunestadon, sed la lecionoj komenciĝis nur sabaton matene.

Laŭ diversaj niveloj estis kvar grupoj, kiujn gvidis la elstaraj esperantistoj Rob Moerbeek, Bert de Wit, Arjen-Sjoerd de Vries kaj Roel Haveman.

Sabaton posttagmeze estis publika leciono fare de argentinano *Atilio Orellana Rojas*, kiu tion faras laŭ rekta metodo, kio signifas, ke li tute ne uzas nacian lingvon. Lia metodo nomiĝas ankaŭ Cseh-metodo.

Pro la centjariĝo de Esperanto en Nederlando estis loterio por la plej novaj esperantistoj. Oni povis gajni por venonta studosemajnfino la kotizon, kiun vespere transdonis Els van Dijk nome de asocio Esperanto Nederland.

Dum la lecionoj Fia van Deursen kaj Mieke van Mook preparis la manĝojn, kio ne estas bagatelo: pli ol 40 buŝoj por plenigi! Estis superevidente, ke ili tre spertis pri tiaj aferoj.

Ĉiuj deĵoris laŭvice por lavi la manĝilaron, sed feliĉe estis volontuloj por kunhelpi ĉiufoje.

Ĉe la fino de la semajnfino organizantino Marijke Lathouwers dankis ĉiujn, dirante, ke ŝi aranĝis *ja* la semajnfino, sed *ne* la bonan etoson. Pri tio respondecas la partoprenintoj mem.

En marto 2006, proksime de Almelo estos la sekva studosemajnfino. Tie povos partopreni pli multaj partoprenontoj.


Vi do venu amase!



publika leciono



Atilio Orellana Rojas




Dylan Wempe kaj Rob Moerbeek

As winter wickt

Zun komt weer veur n dag en moakt,
vot al wat driester,
van noaber's dak n glinster-glieboan
doar k op sliester
noar mien jeugd weerom - Mien pa
pakt mie ien t hof bie haand en zegt:
Dij vogel dijs nou heurze is n liester.

Peter Visser



Kiam vintro cedas

Ree montras sin la suno kaj
tuj aŭdace ĝi transformas
najbaran tegmenton al glitiga-glitejo
sur kiu mi en tempo retroiras
al la pasintec'- En la korto
kaptas Paĉjo mian manon
instruante: Estas turdo, la birdo
kiun vi aŭskultas.

Luit Staghouver



*Agrablajn Festotagojn
kaj
Feliĉan Novjaron*

Esperanto-klubo GRONINGEN-DRENTE
T.W.S. Mansholtstraat 25
9728 MC GRONINGEN



ESPERANTO - taal zonder grenzen